FN PER ANC 47

BULLETIN TRIMESTRIEL - TRIMONATA BULTENO Nº I6

- JUNIO I97I -

Redaktas: S-ro JOUIS E. 62I Rue Georges Mugnier - 76 BOIGUILLAUME.

Sendu la manuskriptojn antaŭ la I0a de Februaro, I0a de Majo, I0a de Aŭgusto, I0a de Novembro.

E N H A V O.


- Ĉu la Normandoj ŝatas la solecon?
- Turisma Kalendaro.
- Vivo de la Normanda Federacio.
- 26a kongreso de S.A.T.Amikaro.
- Vivo de la Grupoj.
- Normanda Kongreso en Vire en I972.
- Eksternormanda agado.
- Anoncetoj.
- Peto de Itala Samideano pri parapsikologio.
- Adresŝanĝo.


## Ĉu la Normandoj ŝatas la solecon?

Dum la monato Aprilo okazis 2 kongresoj, kiuj devus interesi la Normandojn: unue la 26a kongreso de S.A.T.Amikaro en Yvetot je Pasko, due la komuna kongreso de la Normanda kaj Pariza federacioj en Mantes la Ville, je la fino de Aprilo.

La unua kongreso estis tiu de speciala organizo sed estis nacis-kalakaj okazis en Normandio mem.Ĝi enhavis I29 partoprenantojn el kiuj eĉ 29 venis el 4 eksteraj landoj.., sed nur ( krom la lokaj organizantoj, komprene-ble) 3 Normandoj !

La dua kongreso ne povis ne interesi la Normandojn, ĉar temis pri la kongreso de ilia Federacio komune kun tiu de la Pariza Federacio. Fakte, el la cento da personoj, kiuj ĉeestis tiun kongreson, kiom da Normandoj estis? Proksimume 30 !

Ĉu do la Normandoj nun malemas kunveni kaj labori kune? Se tio estus, tio estus tre malfavora al la disvastiĝo de Esperanto en nia regiono. Unueco estas forto. Kion individuo ne povas fari, grupo povas entrepreni, kaj kio ne estas farebla de grupo povas esti farata de regiona asocio. Sed por ke asocio sukcesu en sia tasko, necesas ke ĉiuj kunlaboru, interŝanĝu ideojn kaj spertojn, kaj eĉ kunvenu por praktiki la lingvon, ĉar ĉio, kion oni ne ekzer-cadas, iom post iom pereas.

Do, ni ne vivu izole, ni kunvenu regule, unue en la grupoj, sed

ni havu ankaŭ fortan regionan vivon, kaj kompreneble, vera Esperantisto ne kontentiĝas per la regiona vivo, sed partoprenas la nacian vivon de nia movado, kaj ankaŭ ( kaj eĉ precipe, ĉar nia movado, estas esence internacia) ni partoprenu internaciajn renkontiĝojn kaj tute speciale la grandajn internaciajn kongresojn.

Vi trovos la liston de la ĉefaj renkontiĝoj en la pasinta numero de nia bulteno, sed ĉar ĝi estis nekompleta, ni publikigas en tiu numero suplementon al kiu ni povas aldoni la diversajn restadojn en Gresillon. Legu ilin....sed ne nur legu, partoprenu !!!!!

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

- I97I - TURISMA KALENDARO.

SUPLEMENTO. Vidu la Ian Liston N° I5

- JULIO -

- 9 - I7 . Greka Seminario sur Samos. Grekujo.
- II - I8 . Internacia Tendaro en Lahti. Isoranta. Finlando.
- I2 - I7. Junulara Esp. Libertempo apud Milano. Italio.
- I5 - 25. Internacia Renkontiĝo en Szeged. Hungario.
- I9 - 24. 3Ia-Hispana Kongreso. Alicante. Hispanio.
- 24 - 29. Internacia Restado por jubilea jaro de Gotenburgo. Sv.
- 24 - 3I. Filozofia semajno. Martinus Instituto. Danlando.
- 25 - 28. Postrenkontiĝo en Hodmezövasarhely. Hungario.
- 3I - 7/8. 39a Internacia Kongreso de Blindaj Esp. Londono. Bri.

- AUGUSTO -

- 6 - I5. I3a Balta Esp. Tendaro. Valga. Latvio.
- 8 - I5. I8A Internacia Ferio Semajno. Krommenie. Nederl.
- 28 - 29. 58a Japana Esp. Kongreso. Tokio. Japanio.

- SEPTEMBRO -

- 4 - I0. 42a Itala Kongreso Grosseto apud Florenco. Italio.
- 5 - II. Eŭropa Feriosemajno en Svislando, ĉe la lago de l a kvarkantonoj. Svisio.
- I7 - 30. 7a Esp. Ora Pola Aŭtuno. Miedzygorge. Pollando.
- 24 - 27. Cekoslovaka renkontiĝo en Vsetin. Cekoslovakio.

... Planu viajn venontajn ferioj, kaj elektu !!!

Por havi koresponadresojn pri tiuj renkontiĝoj, skribu al :

Sinjoro Petro Lemarchand
43 Rue de Lessard.
76 - ROUEN.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++


---- Por la redaktado de la venontaj bultenoj, ni atendas viajn sugestojn.

Antaŭan Dankon !!!!!!

# - VIVO DE LA NORMANDA FEDERACIO. -

Ĉi-jare la normanda kaj pariza federacioj aranĝis komunan kongreson, kiu okazis la 24 - 25-an de Aprilo en Mantes la Ville ( Yvelines). Partoprenis centoj da personoj el 3 Landoj. Sabaton postagmeze, la publiko kaj la kongresanoj povis viziti la tre bone prezentitan ekspozicion, kiu anoncis multaj afiŝoj tra la urbo. Vespere, okazis prezentado de diverslandaj Esperanto-filmoj. Post la ĝeneralaj kunvenoj de ambaŭ federacioj, dimanĉon matene, la vicurbestro salutis la ĉeestabtojn kaj regalis ilin per ĉampanvino. Agrabla manĝo en bona restoracio kunigis ĉiujn en gaja etoso, sed, tuj post la deserto la aŭtomobila karavano rekondukis ĉiujn al la urbdomo, kie rava spektaklo pri kantoj, dancoj, skeĉoj, deklamo atendis ilin.

Post tiu ĝenerala raporto, jen resumo de la normanda kunveno: post prezento de la morala kaj financa raportoj, unuanime aprobitaj, oni renoviĝis trionon de la konsilio. Ĉar neniu nova kandidato sin proponis, S-ro Pottie kaj S-ino Vincent estis unuanime reelektitaj. Por anstataŭi F-inon Beaudoin demisiintan, oni proponis S-ron Colleu: ni atendas lian akcepton. La estraro konsistas nun el: S-ino Vincent, prezidantino; S-ino Lavallée, vicprezidantino; S-ro POTTIER, sekretario; F-ino Bonnet, kasistino. En sia rezolucio, la federacio esprimis la deziron, ke ĉiu normanda esperantisto komprenu pli bone la va loron de sia lingvo, uzu ĝin pli larĝe kaj en ĉiu ebla okazo. Por tio, kelkaj partoprenantoj sugestis, ke ni aranĝu intergrupajn aranĝojn, ekskursojn, pik-nikojn. Aliaj petis pli oftajn renkontojn interkursgvidantoj por interŝanĝi sper tojn kaj ideojn. Fakte, se ĉiu restas izolita en sia angulo, neniam ni povos progresi kaj atingi la finan venkon de Esperanto. Unueco estas Forto. Ni ne forgesu, ke la poresperanta agado estas individua ( instruado de la lingvo, informado de buŝo al orelo) kaj organiza: nepre necesaj estas asocioj por reprezenti kaj defendi Esperanton ĉe la diversaj instancoj lokaj, regionaj aŭ naciaj, por ricevi subvenciojn, organizi manifestaciojn, eldoni infor- kaj stud- materialon. Sed por havi asocion necesas...multaj membroj. Ni ne diru " Kion mi ricevos per mia kotizo?" sed: " Kion povos fari la asocio per mia kotizo? " Ankaŭ ni ne diru " Mi ne aliĝas, ĉar en la asocio tiu persono ne plaĉas al mi." Per tiaj infanaĵoj, la perdanto estas la lingvo mem. Nepre necesas subteni la naciajn asociojn por konvinki niajn samlandanojn kaj konstrui solidajn murojn, sur kiuj povos firme sin apogi la tegmentoj de la internaciaj organizoj laŭ la jena skemo:




Se ne plu ekzistas U.F.E., sekve la federacioj el kiuj ĝi konsistas, la tuta konstruaĵo (U.E.A.) disfalas, ĉar U.E.A. apogas sin <u>sur la landaj asocioj</u>, el kiuj ĝi konsistas.
Vi tre ĝojas, kiam, de nia pariza sekretariino, vi ricevas afablan respondon al via inforpeto, vi tre ŝatas rapide ricevi la bezonatajn librojn. Kiam vi trapasas Parizon, vi estas feliĉa ripozi momenteton en agrabla ejo, iom babili esperante kun la sama bonhumora sekretariino. Per kiu mono ni pagas ŝian (malaltan) salajron? Per viaj kotizoj. Per kiu mono ni pagas la (altan) luprezon de nia sidejo? Nur per viaj kotizoj. Ni ricevas neniun subvencion, neniun monhelpon. Vi prave opinias, ke la ofsetitaj numeroj de nia revuo ne tre bel aspektas. Sed, anstaŭ grumbli pri la tro longa financa raporto, rigardu ĝin atente kaj konstatu, kio kostas <u>unu</u> presita numero. Per kiu mono ni pagas la presiston? Per viaj kotizoj. Vi tre ŝatus pruntepreni librojn el la biblioteko de U.F.E.

Kiu oficisto konsentos ordigi ĝin se li ne ricevos decan salajron? F-ino Buulier ne povas tion fari, ĉi estas sola kaj al ŝi sufiĉas la sekretariata laboro. Por iom malpezigi ŝian taskon, sendu viajn abonojn kaj kotizojn al la federacia kasisto, kiu transdonos al U.F.E. Vi grande kaj efike helpos ŝin kaj la tutan asocion.

Certe plaĉus al vi ricevi migrantan ekspozicion, kiu liverus al vi tute pretan materialon por via informa laboro. Per kiu mono ni povos ĝin aĉeti? Ankoraŭ kaj nun per viaj kotizoj. Ĉu vi vere opinias, ke per via "... Kontribuo", ni povas multon fari? Ĉu vi pli bone komprenas nun, kial ni rekomendas de vi aliĝon kiel membro-abonanto? Ekde la Ia de Septembro, la kotizo respektive iĝos 7 Fr kaj 35 Fr. Se vi ne plu volas havi tiun ĉiujaran zorgon kaj enkore progresigi nian komunan aferon, profitu la okazon fariĝi dumviva membro je 600 Fr ( en Septembro estos 700 F !) Se vi opinias, ke tiun sumon vi ne povas pagi en unu fojo, skribu al la Federacia Kasisto, kiu klopodos aranĝi la aferon.

Nur per unuecaj klopodoj kaj streĉitaj fortoj, ni antaŭeniros. Estu konsciaj kaj veraj amikoj de Esperanto.

Fédération Normande des Centres Culturels " Esperanto "

C.C.P. ROUEN 2348 06 Z

Adreso de la nova kasistino:

Fraŭlino BONNET Sylvie

6 Boulevard Nehou

27 - LES ANDELYS.

---

- NORMANDA [illegible] EN VIRE EN 1972. -

Sinjoro Jouis vizitis la Esperanto grupon en Vire, invitita de SinjoroLEGRET? de la 7a ĝis la IIa de Junio.

Estas tie kelkaj bonegaj esperantistoj : S-ro Legret; S-ro Sapora; S-ro Colleu..... Sinjoro Colleu staciestro, faras kurson ĉe la Maison des Jeunes, belega domego !

La grupo akceptis fari la Kongreson en Vire, proksiman jaron.

Mi povas aserti ke la urbo estas vizitinda kaj gastema. La ĉirkaŭaĵoj : Normanda Heĝkamparo, estas pentrinda. Do, kvankam la regiono estas iom malproksima por kelkaj esperantistoj, mi forte konsilas ke oni iru al Vir prefere por kelkaj tagoj se oni volas konatiĝi kun la multnombraj vidindaĵoj de tiu bela regiono.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

ADRES - SANGO.

Notu bone la novan adreson de niaj geamikoj POTTIER.

Pierre POTTIER
2I Quartier REFIGNY. 76 - YVETOT.

Dankon.

# VIVO DE LA GRUPOJ.

## - ROUEN. -

Du kursoj por komencantoj daûre funkcias : La unua gvidata de Petro QUILLAUD en Grang Quevilly, la dua gvidata de S-ino Lamy en la teknika liceo Gustave Flaubert en Rouen. La nombro de la Gelernantoj estas ĉiam la sama : ok plus du.

La membroj de la grupo kunvenas ĉiumonate en la malnova lernejo RENAN rue Marion, Sotteville les Rouen kaj komune studas pere de la lern-libro " Manuel de preparation à l'Atesto pri Kapableco " intencante iam trapasi tiun ekzamenon.

Kelkaj el niaj membroj partoprenis diversajn renkontiĝojn:

- S.A.T.Amikara kongreso en Yvetot.
- U.F.E. Kongreso en Lyon.
- Germana Kongreso en Nûrnberg.
- Komuna kongreso de la Normanda kaj Pariza Federacioj de U.F.E. en Mantes la Ville.
- Partopreno de du el niaj membroj dum la jubilea SAT. Kongreso en Parizo estas jam planita.

P. Lemarchand;

## - LES ANDELYS. -

La grupo sendis al la kongreso de la Normanda federacio en Mantes - la- Ville( 24 -25an de aprilo I97I) kvar reprezentantojn.

La 22-an de majo okazis sesio por " Atesto pri Lernado " la kvar kandidatinoj sukcesis. Partoprenis ankaû unu kandidato el ST-Etienne - du - Rouvray, kiu brile sukcesis.

La grupo sendis unu reprezentanton al la markola kongreso en Calais je Pentekosto.

La 5-an de Junio okazis sesio por " Atesto pri Supera Lernado "

La 26-an de Junio, oni disdonis la premiojn al la gelernantoj de la diversaj kursoj.

Unu grupano partoprenos la U.K. en London, dua la TEJO Kongreson en Edinbourg, tria la Junularanĝon en Grekujo, kvara la lastan periodon en Grsillon. Tri knabinoj partoprenos la infankongreseton en Londono.

S-ino VINCENT.

## - LE HAVRE. -

La grupo akceptis, la 27an de Majo, Fraûlinon Zak. Tiu Pola esperantistino, kiu vojaĝas sur pola komerca ŝipo, reiras, el Afriko,al Stettin.

Du havraj esperantistoj akompanis ŝin dum la vizito de le Havre kaj vespere okazis simpatia kunveno en la Kafejo " Le Prader " kunveniganta Fraûlinon Zak kaj preskaû ĉiuj havraj grupanoj.

- Du Havraj amikoj partoprenis la S.A.T.Amikaran Kongreson en Yveto
- Unu persono partoprenis la Kongreson en Mantes la Ville.

S-ino PELTIER.

- VIRE -

Dank'al la afableco de S-ro Colleu (staciestro) la Normanda Kongreso okazos en Vire en 1972. Sinjoro Colleu tre ĝuis la Internacian Fervojistan Kongreson en Maribor ( Jugoslavio) antaŭ nelonge. En tiu Kongreso partoprenis pli ol 700 personoj.

En la nova faldfolio pri Vire troviĝas esperanto-teksto ĉirkaŭ 10 linia.

Reklam teksto pri Vire ( pagita de la Turisma Asocio) estas denove presita en la Jarlibro 1972.

Tiujn lastajn atigaĵojn ni ŝuldas al Sinjoro R. Dancal, Prezidanto de la Turisma Asocio, kiu favoras al nia afero.

Pri ĝenerala propagando; Sur kovertoj aŭ poŝtkartoj verku kiel eble plej ofte propagandilojn( steloj, glumarkoj) kun vorto ESPERANTO.

La kurso de S-ro Colleu en Maison des Jeunes et de la Culture kontentige daŭras.

S-ro LEGRET.

- FECAMP. -

Sinjoro Permanne ricevis la viziton de Germana Esperantistino dum Junio, ŝi vizitis diversajn urbojn de nia regiono.

- YVETOT. -

Dum la S.A.T.Amikara Kongreso pri kiu ni rilatas sur alia paĝo, sesio de ekzameno okazis. L'Atesto pri Lernado estis tre bona sukceso por 5 gelernantoj; 3 el Yvetot kaj 2 partoprenantoj de la kongreso.

Fine de Junio, pro ne ricevo de la teksto por la "Atesto pri la Supera Lernado", tiu ekzameno ne okazis. Ĝi okazos en Septembro.

La 27an de Junio, ni kunvenis por pikniko en la parko de la Kastelo de Bois Himont( situanta inter Yvetot kaj Caudebec)malfeliĉe pro diversaj kialoj, la ĉeestantoj estis malmultaj, malgraŭ tio, Havranino kaj Ruenano vizitis nin.

En Septembro okazos letervespero, ĝis nun pli ol 100 poŝtkartoj alvenis.

Kelkaj Yvetot-anoj parteprenos diversajn kongresojn kaj renkontiĝoj dum la ferioj.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

Eksternormanda Agado.

La junulara esperanto-grupo de RONCQ ( Nordo de Francio) disvastiĝas, ĉiu lunde, deko da gejunuloj kunvenas por lerni Esperanton, gvidate de Claude Martins. Lastan jaron 1970, 2 gelernantoj trapasis sukcese " Atesto pri Lernado".

Ĉi-tiu-jare 1971, 4 el ili sukcesis pri la sama ekzameno kiu okazis dum la Internacia foiro de Lille en Aprilo.

Jam du el la gelernantoj anstataŭos la gvidanton dum lia foresto pro laboro en Tunizion.

Ni gratulas tiun junularan lernantaron kiu ekde nun lernas al " Atesto pri Supera Lernado."

# 26a S.A.T.Amikara KONGRESO en YVETOT.

Raporto de Sro BOLLE el Berlino.

Sabaton matene mi anoncis min en la akceptejo, kaj kiel supozite mi jam trovis malnovajn geamikojn. En la sama loko, junularhejmo, kiu samtempe estis la kongresejo, troviĝis la Libro-servo de S.A.T. Amikaro kaj Esperanto-Ekspozicio; la lasta estas vizitita dum la tagoj antaŭ la kongreso de pli ol 800 Personoj . Tio signifas grandan sukceson rilate la nombron de 10.000 loĝantoj de YVETOT. Partoprenis 130 kongresanoj, inter ili 29 eksterlandanoj el Belgio, Nederlando, Britio kaj mia modesta persono. La manĝojn ni ricevis, escepte la ge-dojn loĝantajn en hoteloj, en la memserva restoraci de la junularhejmo. Kvar lokaj aŭ regionaj gazetoj raportis detale ku n bildoj pri la kongreso. La O.K.K. de tiu ĉi kongreso estis laŭ mia opinio la plej juna el tiuj de la lastaj Esperanto-Kongresoj, la meza aĝo estis 32 jaroj!! Kaj ilia preparado kaj plenumado de l'kongreso estis treege bonaj.

Sabaton posttagmeze akceptis la urbestro de Yvetot, S-ro Doktoro Bobée( li iom malfruiĝis pro urĝa kuracista helpo), en la urbodomo; parolis nia kamarado Grandiére , la urbestro kaj O.K.K.ano P.POTTIER. Oni regalis nin per honor-aperitivo. Kiel kutime dum niaj kongresoj okazis vespere interfratiĝa renkonto en la kongresejo, dum kiu estis elektita " Fraŭlino Esperanto", Kamaradino Jacqueline.La gejunuloj ĝojigis nin per skeĉoj kaj poemoj.

Dimanĉo antaŭtagmeze okazis la solena malfermo de l'26a S.A.Tamikarakongreso; krom la nederlanda, belga kaj brita delegitoj ankaŭ mi salutis la ĉeestantojn en la nomo de la LEA por German- lingvo Sekvis la unua laborkunsido. Tagmeze atendis nin riĉenhava bankedo en Yvetota-lernejo, kiu pro la longa daŭro donis al ni okazon por pli amikiĝi; la manĝolisto estis verkita en tre humorplena maniero. Partoprenis ankaŭ la urbestro kaj lia edzino Posttagmeze ni ekkomencis busan ekskurson laŭlonge de Sejno; ni admiris la belan pejzaĝon de Normandio kaj rigardis la ruinaĵon de l'roma teatro en Lillebonne kaj miljaran kverkon de Alluuville. Post la komuna vespermanĝo denove skeĉoj, flutludo de knabo kaj prezentadode malnovaj normandaj popoldancoj de grupo el Rouen, kies estro estas samideano.

Lundon antaŭtagmeze okazis la dua laborkunsido; post la fino k-do Barthelmess prelegis pri la celoj kaj agado de S.A.T. Posttagmeze la kongresanoj kunvenis al la tria kaj lasta kunveno. Dum ĉiuj tiuj laborkunsidoj estas priparolitaj kaj pridiskutitaj la raportoj, la venontaj aranĝoj , la varbado kaj la instruado. La sekvonta S.A.T.Amikara Kongreso okazos PASKON 1972 en Narbono, kie en 1964 kunvenis la S.A.T.Anoj al la 37a S.A.T.kongreso. La elekto de la nova estraro okazis prekaŭ unuanime. Post finiĝo de l'kongres komenciĝis la lotumado, kiu ofertis valorajn gajnojn. Gajarondo kun skeĉoj flutludo kaj multe da dancoj ( mi ne nombris la vango-kisojn dum la" tapiŝa danco ") finis la amuzan vesperon.

La lasta tago, mardo, estis dediĉita al tuttaga busa ekskurso. Ni transiĝis per pramo la Sejnon ĉe Caudebec, veturis tra la rava pejzaĝo ĝis Honfleur, pitoreska urbeto apud la enmariĝo de Sejno vid-alvide de la Havre. Ni reveturis trans la plej longa pendoponto de Eŭropo ĉe Tancarville en kiu loko ni manĝis. Fiere anoncas tabulo apud la ponto, ke dum la konstruado de la ponto, eĉ ne unu laboristo mortakcidentis!! Nur preterpasinte Le Havre ni vizitis poste la klifojn ĉe Etretat kaj Fecamp. Bedaŭre la vetero estis tre nebula, malutila por la fotistoj inter ni . Atinginte Yvetot'on ni devis adiaŭi; per fervojo aŭ aŭtomobiloj preskaŭ ĉiuj kongresanoj veturis hejmen.

Ĝis revido en Parizo kaj Narbono.

Laŭ la revuo " BERLINA VOKO."

DEMANDO DE ITALA SAMIDEANO PRI PARAPSIKOLOGIO.

Ni ricevis cirkuleran alvokon de profesoro Corrado CERRI CALZONI Casella Postale I59 - I I 305I BIELLA ( Italujo) kiu petas ĉiujn esperantistojn kiuj interesiĝas al parapsikologio interrilati kun li por la celo aperigi Esperantan Eldonaĵon pri tiu nova fako de la scienco.

Li akceptas de nu artikoletojn 60 - 90 liniajn pri interesaj okazintaĵoj.

,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,

Pro transloĝiĝo kaj familiaj malsanoj, tiu bulteno iom malfrue aperas. Bonvolu pardoni al ni. Ni faros nian eblon por ke la venonta numero aperu je la normala dato.

Por faciligi al ni la laboron, Bonvolu sendi viajn raportojn

DANKON!!!!!!!

! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! !

A T E N T U !!!!

S E V I V O J A Ĝ A S ......

Estu prudentaj survoje. Vi devas konservi vian vivon por legi nian bultenon kaj por prepari la propagandan laboron farotan dum Septembro

B O N A J N F E R I O J N A L Ĉ I U J!!!!!!

Polycopié par le Centre Culturel d'Esperanto d'Yvetot.

- DEPOT LEGAL 2é TRIM. 7I
la gerante Mme POTTIER CL.